ŜTONVIZAĜOJ



Ŝtonvizaĝojn mi vidas ĉie ajn,
eĉ miahejme kaj en hejmo de aliaj.
Mi vidas ŝtonvizaĝojn surstrate,
en la placoj, kortoj, montoj.
Ŝtonvizaĝoj... se ili ridas, ridas la tutan tempon;
se ili ploras, ne laciĝas plori...
ili estas larmoj kiuj neniam finiĝas,
kvankam neniam gutas... nur glitas.
Ekzistas ŝtonvizaĝoj penskapablaj...
kiuj sen pensoj, ŝajnas pensi la tutan tempon.



Estas ŝtonvizaĝoj tristecaj...
kiuj estas tristaj, tre malgajaj,
kvankam ne sciante la kialon.
Tamen la plej granda malĝojo en tiuj ŝtonvizaĝoj
estas, ke multaj homoj preterpasas, ilin nerimarkante.
Kaj ili tute pravas! Kiu ŝatas diskriminon?
Ŝtonvizaĝoj ne trovas la vivon malfacila aŭ facila,
ili simple vivas la vivon... ne multe vivante ĝin.



Ŝtonvizaĝoj ne trairas la vivon...
ilin la vivo trairas.
Vidante la vivon pasi, ili kun neniu kverelas,
nur oferas belecon al tiu, kiu scias rigardi.
Ha, mi preskaŭ forgesis...
Estas ŝtonvizaĝoj en la tombejoj...
tiuj ĉi... senegale saŭdadojn vekas.
Priploras la tutan tempon... sen larmojn verŝi.
Iliaj larmoj fluas la tutan tempon... sed ne gutas.
Ploro ŝtonigita... pro la doloro pri tiuj, kiuj forpasis.



de Ediberto Bentes Pinna & Charlie Mei Mei
Traduko de Célio Freitas Martins
Bildaranĝoj de Liette Lêla